Christian Morgenstern,

# Renkonto

*tradukita de Willy Nüesch*

Ni sidis ĉe du tabloj - lok'? - en mond'...
Trinkejo, urb', land', stel' - ne gravas ja!
Ni sidis ie en la vivoregno...
Ĉe tabla duo, tie ĉi kaj tie.

Kaj brulis mia kor': Knabino fremda,
se mi en ĉi okulojn versi rajtus -
se rekompencus min ĉi reĝa buŝo -
kaj se ĉi tiu reĝa man' min kronus - !

Kaj brulis via kor': Junulo fremda,
pro kio vi profunde min ekscitas -
ke mi genuojn viajn amus braki -
kaj diri sole: Kara, kara, kara - !

Kaj niaj koroj preskaŭ kunbatiĝis.
Sed ĉiu restis ĉe l' rigida tablo -
kaj fine ni nin levis kun l' aliaj -
eliris - kaj nin plu neniam vidis.

*Traduko de la Germana poemo "Begegnung" de* Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de* Willy Nüesch *(Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, ∗1927-05-09).*

*Arg-125-245 (2013-08-28 18:40:08)*

*La tradukinto Willy Nüesch (Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56)donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net". Li ankaŭ kontrolis tiun chi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo "Fonto" n-ro 274 en Oktobro 2003.*